

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, por la propagando de esperanto kaj diskonigo de la Historio, Arto, Literaturo, folkloro kaj naturaj belaĵoj, de nia lando.—Redakcio: Glorieta de Bilbao, 5.
Julio Mangada Rosenörn.—MADRID

II^a
JARO

NUM. I kaj II.—JANUARO-FEBRUARO 1929

II^a
JARO




ASTURIAS

Fama kaj belega ponto de Cangas de Onís,

AL LA HISPANA ESPERANTISTARO

Ĉi tiu numero certe surprizos vin; per ĝi ni sciigas al vi, ke Hispana-Esperanto duobligos, kaj komplezas ĉiujn samideanojn, ĉar multaj deziras hispan-esperantan tekston. Ĉi tiu estos eĉ instrua, kiel vi povas rimarki, kaj iros la antaŭan vojon sen deflankiĝo ia, kun la espero, ke la intereso de la samideanaro fariĝos pli kaj pli granda por ankoraŭ plinombrigi la paĝojn. Jen nova sukceso de nia Hispana Esperanto-Asocio, kiu povis okazi dank'al interkonsento absoluta inter nia samideano S-ro Julián García Aguirre kaj mi: li prenas sur sin la taskon eldoni ĝin, mi tutan alian laboron. Ni, ambaŭ, deziras al ĉiuj hispanaj samideanoj ardon por fortigi pli kaj pli H. E. A.n kaj al ili kune kun la cetero de la tutmonda Esperantistaro feliĉan novjaron.

Julio Mangada Rosenörn.



Pri Asturias

(LANDO EN KIU OKAZOS NIA VIII^a KONGRESO)

Oni povas aserti, ke iuj el kutimoj kaj festoj de ĉi tiu regiono devenas de tre antikva epoko, de la tempo kiam la Grekoj, irante supren laŭlonge la rivero Ebro, alvenis al Vaska, Kantabria, Asturia kaj Galicia regionoj, kaj sin loĝigis en tiuj regionoj. De la Grekoj la indiĝenoj akiris tiujn kutimojn kaj festojn, el kiuj, laŭ verkisto, «ankoraŭ restadas la lirikaj versaĵoj pri la edziĝfestoj kaj la funebraj plendoj en iuj valoj same, kiel dum la tempo de Estrabon, kaj kiel en Grekujo nuntempe». Asturias same, kiel la najbaraj regionoj, estis tute sendependa ĝis la tempo de Aŭgusto, sed neniam la indiĝenoj submetiĝis absolute al la Romanoj, kaj ĉiam obstine kontraŭstaris ĉion, kio devenis de la tirana konkirinto kaj kio povis modifi la indiĝenajn, leĝojn, tradiciojn, ritojn kaj praktikojn; sed, super ĉio, restis

tute fremdaj je la influo de la konkirintoj la indiĝenoj loĝantaj ĉe la montaroj, tiamaniere, ke romanaj verkistoj, eĉ de la tria jarcento, post du jarcentoj de roma regado, rimarkis leĝojn, kutimojn, tradiciojn, k. t. p. tute purajn transdonitajn de generacio al generacio spite de la diversaj konkirintoj, de la lingvo-modifoj, de la kredoj, de ĉiaj ŝanĝoj, el kiuj ankoraŭ granda parto atingis nian tempon.

La simplaj kaj malmultaj primitivaj religiaj, politikaj kaj socialaj leĝoj, estis laŭ versaĵoj, laŭ kantoj, kiujn tradicie oni konservis de buŝo en buŝon, kaj kiujn oni rememoris kaj sankciis kantante, precipe dum la religiaj kultoj, ĉe la plenluna lumo; tial supozinde estas, ke ankaŭ oni utiligis la versaĵojn, kantojn, por aliaj vivopraktikoj ĉu individuaj ĉu kolektivaj. Konstanta himno de la indiĝenoj estis ilia fieraj kaj kontraŭstarebla amo al sendependado, kaj kantante ili mortis dum la batalo, meritante de la Romanoj juĝon, per kiu ĉi tiuj difinas neeblecon pri io, dlrante: «tio estas tiel neebla, kiel atingi, ke asturia batalanto montru la dorsan al la malamiko»: ili preferis morti antaŭ ol forkuri aŭ fariĝi sklavoj. Same supozinde estas, ke la indiĝenoj festis popolajn, gentajn, tribajn eĉ familiajn, okazantaĵojn per kantoj; ke ili esprimis same la ĝojon pro alveno de la printempo; la ĝentilecon. la amon...

Greka kaj romanaj verkistoj priskribis, post la kantabraj militoj; pri la ĝenerala vivmaniero de la indiĝenoj de ĉi tiu regiono, super ĉio pri iliaj militkutimoj kaj aliaj partikularaj kutimoj, ankaŭ pri similecoj kun la keltaj. Tute same sin kondukis la indiĝenoj rilate Suevojn, Gotojn kaj Arabojn. Sed laŭ la preciza evoluo natura de la popolaj kutimoj, kaŭze de la pasado de la tempo, kun la naturaj ŝanĝoj en la religio, lingvo, politika stato, k. c.; kio malnova kaj tradicia estas tio. kio, pli-malpli transformita, alvenis al ni, kaj kio estas tio fremda akceptita kaj adaptita al la vivmaniero, al la estmaniero kaj al la sentmaniero, de la indiĝenoj? Ni konformiĝu ne respondante, ĉar ni ne povas enprofundiĝi en la temon; sed nin kontentigas la jeno: ĉi tiu malgranda regiono, ju malpli granda, des pli riĉa de kantoj, *pli ol kvincent melodiojn ĝi posedas*; kaj tial ke la popolkantoj spegulas la animon de landoj, jen, do, la grandanima regioneto, kiu atendas nin sindoneme, kaj akceptos nin plensente frate dum nia VIII^a Kongreso por enedenigi nin dum ok

tagoj. Aliĝu al la VIII^a Kongreso kiel ebje plej rapide ¡Varbu multenombrajn esperantistojn kaj neesperantistojn por nia VII^a!

Julio Mangada Rosenörn.



PRI TUTMONDA ORGANIZO DE LA ESPERANTISTARO

De antaŭ multe, pro spertado ĉe universala asocio, kiu, pro tro enradikigita fanatika tradicia naciemo ne daŭrigis sian grandan efikan homaman celon tiel sukcese, kiel ĝis la momento firmigi en ĉiuj nacioj la konkirojn, kiuj karakterizis la Modernan Epokon de la Franca Revolucio en niajn tagojn, mi ĉiam pensadis ke la vera Esperantujo postulas forigi tian tradician naciemon, kaj tial en Praha, kiam mi parolis oficiale en la malferma kunsido de la Kongreso same, kiel kiam diversefoje mi parolis dum kunvenoj de U. E. A. en tiu imitinda Kongreso, mi esprimis, ke vera organizo estos des pli forta ju pli simpla; ke individuo, nacia aŭ landa aro el individuoj aŭtonoma, kaj aro el naciaj aŭ landaj rondoj, estas la vera forta kaj firma tutmonda esperanto respubliko aŭ Esperantujo. Konstante mi celis kaj laboris tiun organizon, kaj ĉe mi, en Hispanujo, konstante mi agadis por starigi la tutlandan rondon kiu firme naskiĝis en Cordoba je 1925, kiu ekpaŝis en Madrido, je 1926. kaj kiu mirinde autaueniris de post tiu Kongreso lasta en la ĵusan de Sevilla. Jam antaŭe. dum la I^a Kongreso en Barcelono kaj II^a en Zaragozo same mi parolis, al la III^a kaj IV^a en Valencia kaj Bilbao mi prezentis proponojn pri la celo. Ĉiam mi planis sur la transformiĝo de U. E. A., al kiu antaŭ kelkaj jaroj mi proponis starigon de membra kotizo 2,50 peseta kun rajto nur por la karneto kaj servoj, kaj kiun U. E. A. «*akceptus se mi estus certiginta 500 tiajn membrojn*» U. E. A. ne komprenis la aferon, ne konsciis, ke ĝi ne perdus, ĉar neniu membro aŭ eksmembro povas fariĝi *tia membro*; ke ĝi ĉiam gajnus eĉ fiksante prezon al la Jarlibro kaj al servokuponoj specialaj al *tiaj membroj*; kiuj iom post iom fariĝus plenrajtaj membroj.

Nuntempe, jam de du jaroj (Kongresoj de Danzig kaj de Antverpeno) montriĝadas sopiro al plej vera Esperantujo ol nuntempa, al pli demokrata stato de la tutmonda esperanto — movado, ol la nuntempa, kiu estas tutplena absurdaĵo. Sed la ĝenerala sopiro ne estas detruema, sed aliformigema; la ĝenerala sopiro estas al la starigo de plej simpla organizo sur la bazo de U. E. A. en kiu ĉiuj esperantistoj estu membroj de la tutmonda esperanto — ŝtato per pago de kiel eble plej malalta kotizo egala por ĉiuj landoj. Mi multe aŭdis, mi multe parolis, pri ĉi tiu afero; multe mi faris, kaj gvidate de la celo, kiam la VII^a Kongreso Hispana de esperanto decidis sian literaturan Konkurson, kaj oni min instigis por difini la temojn, mi enkalkulis tiun pri la plej simpla tutmonda esperanto organizo kaj sur la februara n-ro de ĉi tiu gazeto, mi aperigis artikolon, instigante partopreni la Konkurson al tiu temo. Je aprilo la Loka Organiza Komitato ricevis la projekton kiu, atingis la unuan premion kies, aŭtoro estas la kompetenta klera kaj sperta samideano de Barcelona, S-ro Jozefo Anglada Prior; jen ĝi, ĉar mi opinias, ke ĝi estas tre grava kaj ke ĝin devas koni la tuta esperantistaro:

PROJEKTO

pri kiel eble plej simpla organizado de la Tutmonda Esperantistaro.

I

Nia organizo estas tio, pri kio oni lastatempe multe plendas kaj kritikis. Estas lokaj esperantistaj grupoj; klarigas sian necescon internaciaj societoj, ligoj, asocioj. Oni starigas devojn al «vera» esperantisto, ke li *devas*: esti ano de U. E. A., esti aktivulo ĉe nacia asocio kaj tria postulo estas aparteno al loka grupo. Sed tion oni volas forgesi, ke esperantisto estas unue homo kiu estas ligita plejparte al unu loko kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Kial devas homo aliĝi al iu societo malproksima de kiu li ricevas profite membrokarton kaj eble iun jarlibron, dume

spirita profito estas nur sento, ke li estas ano de kelkmilana (malproksima) societo, sed societon men li devas nur imagi. Eble tiuj personoj, kiuj estas en malbonaj rilatoj kun siaj proksimuloj efektive sentos necesecon je tio, ke ili estu anoj de granda aro ideala. Estas vere ke multaj uzis bonrezulte servojn de U. E. A. Sed tiuj homoj(kaj okazoj) estas esceptoj inter tuta esperantistaro. Dume rigardante izolajn, lokajn societojn, ni vidas, ke ili estas plejparte malgrandaj kaj ofte mankas al ili eĉ reputacio. Esperantistaj societoj estas ofte rigardataj kiel societoj (ekzemple) antropozofaj aŭ spiritistaj rondoj, kies agado ne disvastiĝas, sed ankaŭ ne elmortas, ĉar kiom da personoj malaperas de iliaj rondoj, tiom da novaj interesiĝuloj troviĝas. Tiel ke efektive estas bezonata ia potenca esperantista komuna organizaĵo. Sed dume oni povas neniamaniere malaperigi nunajn esperantistajn organizaĵojn. La solvo de nia organiza problemo laŭ tiu ĉi projekto estas jena:

Restigante ĉiujn esperantistajn organizaĵojn escepte I. C. K. (K. R.) reorganizi nunan U. E. A. kiel tutmondan esperantistan organizaĵon nomitan en tiu ĉi projekto T. E. O. Sub. T. E. O. estas opiniata plej potenca kaj diversflanka neŭtrala komuna organizaĵo en kiun oni penas varbi ĉiujn esperantistojn, por ke T. E. O. estu kvazaŭ Esperantujo. Dume povus ekzisti nuna formo de U. E. A. kun delegitoj kiel paralela aŭ subaorganizaĵo ĉe T. E. O. por tiaj servoj kaj praktika uzado de la lingvo kiujn ne permesas statuto aŭ reguloj de T. E. O.

Rilate postulo. *enkalkuli en ĝin la naciajn Asociojn kvazaŭ aŭtonomajn elementojn de tutmonda ŝtato*, la afero estas jena. Similan gravecon al naciaj Asocioj havas ĉefsocietoj (en II ĉapitro, p. 3.) en la landoj; dume naciaj Asocioj estas en rekta kontakto kun I. C. K. per K. R.

Rilate profesiajn Asociojn kiel teknikajn fakojn. Teknikaj fakoj ĉi tie estas verŝajne opiniataj kiel por propagando (de la lingvo), statistiko kaj lingvo. Rilate propagando oni kontaktas kun T. E. O. per amikoj de Esperanto (ĉ. III, tipo B.). Rilate lingvajn demandojn rajtas fakuloj uzante membrecon turni sin al lingva oficejo (ĉ. II. punkto 2. c.). Dume oni povas en kluboj (tipo C.) pritrakti teknikajn aferojn. Statistiko de fakuloj rilatas jam al I. C. K.

La sama afero estas kun movadaj asocioj.

Principe ŝanĝita *centra organizado* esta jena: ĉiu nacia asocio, ĉiu profesia kaj ĉiu movada asocio, ĉiu internacia unuiĝo (ekz. T. E. O.) havanta almenaŭ 100 membrojn elektas po ĉiu komencanta 1.000 membroj 1 reprezentanton en K. R., kiu elektas I. C. K.-on.

II

Tutmonda Esperantista Organizaĵo (T. E. O.) Skizo de statuto de T. E. O.

1) La celo de T. E. O. estas :

a) Unuigi esperantistojn (esp-isto = v.la Bulonja deklarcion pri Esp-ismo) en komunan, neŭtralan, sendependan organizaĵon por ebligi al ili plej vastan utiligon de Esperanto kaj doni al ili laŭpove plej vastajn eblojn de perfektigo en la lingvo.

b) Disvastigi la lingvon Esperanto en la tuta mondo.

c) Helpi al la hazarda evoluo de la lingvo.

2) Efektivigante siajn celojn T. E. O. uzas laŭleĝajn, honestajn, lojalajn, rimedojn kaj metodojn. Subpunktoj :

al a. T. E. O. fondas aŭ iniciatas T. E. O.-societojn en ĉiuj ajn lokoj (urboj, vilaĝoj ktp.) de la mondo. T. E. O.-societoj kontaktas kun la centra organizaĵo laŭ la T. E. O.-regulato tiom, kiom permesas la leĝoj de iliaj ŝtatoj. Paralela (pli bone: suborganizaĵo) al T. E. O. estas (nova) U. E. A. (Sub tiu ĉi nomo oni komprenas kreon ĉe T. E. O. de org. similkaraktera kun la nuna U. E. A. aŭ kaj ĝian eventualan kunigon kun U. E. A kompreneble malestigante post tia unuiĝo la superfluaĵojn de la nuna U. E. A.).

al b. Aŭ kontakte kun T. E. O.-societoj, aŭ kontraŭe, aŭ rekte T. E. O. propagande disvastigas Esperanton.

al c. T. E. O. havas ĉe sia centrejo lingvan oficejon, kiu respondas al lingvaj demandoj, laŭ postuloj serĉas al sencoj (en Esperanto ankoraŭ ne uzitaj) novajn vortojn; registras, publikigas novuzitajn vortojn, gramatikaĵojn en la oficiala gazeto de T. E. O.; kritikis ilin ktp. Lingva oficejo uzas helpon de diversaj spertuloj.

Tiu lingva oficejo tute ne nuligos la necesecon de L. K. Ĝi

estos nur konsilanto al lingvo uzantoj. Tro ofte nun okazas, ke senkonsilaj, sentalentaj verkistoj, nespertuloj enkondukas iujn barbaraĵojn aŭ ion, kion oni tute ne bezonas.

3) Ĉiu persono aliĝinta al loka T. E. O.-societoj estas konsiderata ano de (la universala, komuna aŭ centra) T. E. O. (Lokaj) T. E. O.-societoj estas do grupiĝoj de lokaj T. E. O.-anoj.

Signifas: la anoj de T.E.O. kontaktas pere de sia loka societo. Sed ĉar tio povus esti tro komplika, pro tio kontakti kun T. E. O. povas ankaŭ ĉiuj societoj de ŝtato aŭ regiono kune kiel certa unuo, nomita ĉefsocieto (kiel ĉefsocietoj funkcias societoj de T. E. O.-anoj en ĉiu lando laŭ decido de la koncernaj landaj societoj).

4) *La organizo de T. E. O.* estas jena (neparagrafe):

Pri la organizo de la lokaj societoj estas sube dirite (tipoj).

La ĝenerala agado de la tutmonda T. E. O. estas komisiata al Komitato. Ĝi konsistas el 15-25 membroj (laŭ multo de anaro de T. E. O.) diversnaciaj (sed nacio ne estas tro konsiderata, oni ne dividas la lokojn de Komitato inter nacioj, sed elektas la personojn laŭ ilia valoro). Ĝi estas elektata de la T. E. O.-societoj por 3 jaroj; la kandidatojn prezentas la samaj societoj, Ĉiu societo ricevas po 1 voĉo por ĉiu komencanta cento.

La Komitato elektas la Prezidanton, la Vicprez., la Sekretarion, la Vicsekretarion; la Prezidanton de Estraro kaj ĝiajn anojn laŭofice (sekretario, propagandestro, fincestro, statistikestro, estro de lingva oficejo ktp.) Unu anon en Estraron elektas paralela aŭ suba org. U. E. A.

La Komitato fiksas la ĝeneralan agadon de T. E. O. laŭ skribaj voĉdonoj de la T. E. O. societoj kaj laŭ deziresprimoj de la Kongreso. Privoĉdonas la jaran raporton kaj aŭskultas la Revizian Komisionon pri la administrado de la organizaĵa kapitalo. Decidas pri apelacioj kaj pri la aliaj aferoj al ĝi rezervitaj.

Ĉu la Komitato sidas certan tempon ĉe centrejo, ĉu komitatanoj ricevu la salajron tio dependas de la graveco kaj grandeco de ilia laboro, kaj de la financa stato de T. E. O. Ĝi povus labori per enketoj, cirkuleroj, per skribaj voĉdonoj ktp.

Por regule informi la anaron de T. E. O. pri sia agado, por aŭskulti ĝiajn opiniojn, konsilojn, por plifortigi la senton de unueco inter la anaro, la Komitato kunvokas *la Kongreson* (Krome, kvarono da tutmondaj amikoj de Esperanto rajtas pos-

tuli de la Komitato la kunvokon de kongreso, se la tempo de la kongreso ankoraŭ ne estas fiksita. Revizia komisiono trovante tre gravajn aferojn rajtas deziresprimi al Komitato pri kunvoko de Kongreso), kiun rajtas partopreni laŭ sia iniciato ĉiu ano (sen voĉrajto), dume ĉiu societo rajtas sendi oficialan delegitaron kiel siajn reprezentantojn de ĉefsocieto (kune kun alia societoj) kiu (delegitaro) ricevas po 1 voĉo por ĉiu komen-canta cento de sia membraro.

La Estraran konsiston difinas la Komitato. Estraranoj estas la plej altaj oficistoj de T. E. O.

La Estraro gvidas la tutan agadon laŭ la statuto kaj regularoj de la centra T. E. O. Trarigardas aŭ plenumigas proponojn, deziresprimojn, projektojn ricevitaĵojn de societoj, grupoj, izolaj personoj, rilatajn al la Esperanto-movado kaj ĝia organizo. Administras la kapitalon de T. E. O. Prizorgas la aliajn aferojn al ĝi komisiitajn de la Komitato aŭ per la statuto.

Financajn enspezojn ricevas T. E. O. per kotizoj, de siaj entreprenoj, de donacoj (prizorgataj ankaŭ de amikoj de Esperanto) de ebla subvencio de U. E. A.

Rilate la kotizojn: Centra T. E. O. ricevas certan procenton de la kotizo pagita de ano al loka T. E. O. societo.

5) *La revizio* de la agado de T. E. O.:

a) Amikaroj de Esperanto gardas la reputacian flankon de T. E. O. sendante atentojn, plendojn, aŭ al estraro, aŭ al Komitato, aŭ al Revizia Komisiono.

b) Revizia Komisiono (3 anoj) revizias la tutan agadon de la T. E. O.-centro kaj raportas pri ĝi al la Komitato. Pri revizio rilatanta la Komitaton ĝi raportas al Kongreso kaj en oficiala gazeto.

Kvankam fakte la lokaj T. E. O.-societoj estas memstaraj, oni devus postuli de ili, ke ili: akceptu membrojn, statistiku, propagandu, donu al la anoj kunvenejon, diversflankan eblecon praktiki en la lingvo ktp. Konsideri oni devas ĉe tio, ke Esperanto ne estas centro de spirita vivo (gravas ankaŭ la ĉiutaga laboro, la lernejo, la kleriga, profesia, abstinenca societo, teatro, kinejo, religio, familio, literaturo ktp.). Tial oni ne povas postuli de ordinara membro de T. E. O. tutan sindonemon al Esperanto kaj al T. E. O.-societo. Konsiderante, ke la nunan esperantistan societan vivon aranĝas plejparte personoj ne spertaj en gvidado

kaj aranĝado de societa vivo, (T. E. O. povas evitigi taktikajn erarojn (ekz. maljusta postulo je troa aktiveco de membroj, malatento pri la graveco de bona reputacio, nescipovo aranĝi societan vivon interesa ktp.) presante en koncerna gazeto konsilojn tiu-aŭ aliarilate, eldonante specialajn gvidlibrojn aranĝante kursojn por gvidantoj (sekretarioj) ktp Tre grava estas unueco kaj bonaj tradicioj. Ĉar malbonan reputacion donas hazardeco, pro tio estus bone, que T. E. O. havus lokajn societojn similajn unu al alia (unuecajn) nur kun plej necesaj aliigoj pro lokaj kaj naciaj karakteroj kaj cirkonstancoj. Jen ekzemple tri tipoj de T. E. O.-societoj laŭ grandeco ĝis 50 anoj (tipo A), de 50-500 (tipo B) kaj pli al 500 anoj (tipo C).

Daŭrigota.

BELAJ HISPANAJ LOKOJ

La provinco de Cuenca (Kuenka) estas tre riĉa de naturaj belaĵoj sed la malfacilaj komunikiloj longedaŭre izoligas ĝin, pro kio oni kalumniis ĝin; kaj tial, unu el ĝiaj filoj, tre prave kaj genie, diris: «Cuenca: libro por sciuloj kaj moko al nekle-ruloj». Al ĝiaj naturaj belaĵoj oni devas aldoni la artajn, historiajn kaj tradiciajn. Ni parolu pri unu el la paĝoj de tiu admirinda libro:

La grafo de Priego, C. Fernando Carrillo de Mendoza, kiu havis altrangan postenon en la Kortego de Filipo II^a. kun liaj du filoj, partopenis la faman marbatalon de Lepanto, kaj promesinte, se li kaj liaj filoj ne estus suferontaj danĝeron pro tiu entrepreno, fondi monaĥejon por esprimi tiel sian dankon al dia protekto. Same la grafo, kiel la filoj, havis grandan sorton, revenante sen doloro ia al la hejmo, kaj tiu plenumis sian promeson, fondante la monaĥejon Sankta Mikaelo de la Venkoj. Por tio ĉi li elektis pitoreskan, abruptan izolitan lokon proksiman je Priego, kiun oni alnomas Intermonto de Priego en kiu la rivero *Escabas*, honorante sian nomon (*escabas* estanta tempo de la indikativo, dua persono, de la verbo *escabar*, esperante *fosi*), per titana miljararo atingis fosi sian mallarĝan. profundan kaj kruttranĉitan fluejon, inter la montoj kovritaj de pin-arbaroj aŭ prezentantaj la grandiozecon de la nuda rokaro laŭ labirintaj kaj profundaj tranĉaĵoj, tra kiuj bruiĝante fluas kaj

BELLOS RINCONES DE ESPAÑA

Es la provincia de Cuenca muy rica en bellezas naturales; pero la dificultad de comunicaciones la mantienen en su prolongado aislamiento, que ha dado lugar a que sea calumniada, por lo que uno de sus hijos, con mucha razón y gran ingenio, dijo: «Cuenca: libro de sabios y escarnio de necios». A esas bellezas naturales se suman las artísticas, históricas y tradicionales. Hablemos de una de las páginas de ese admirable libro:

El Conde de Priego, D. Fernando Carrillo de Mendoza, que desempeñaba alto cargo en la Corte de Felipe II, con sus dos hijos, tomó parte en la famosa batalla naval de Lepanto, habiendo prometido, si él y sus dos hijos salían con bien de la empresa, fundar un convento, como acción de gracias a la protección divina. Lo mismo el Conde que sus hijos tuvieron la suerte de regresar sin daño alguno, y aquél cumplió su promesa, fundando el convento de San Miguel de las Victorias. Eligió para ello un pintoresco abrupto y retirado lugar próximo a Priego, que se llama Estrecho de Priego, en el que el río Escabas, haciendo honor a su nombre, en titánica lucha milenaria, ha conseguido abrir su cauce estrecho, profundo y tajado entre las montañas cubiertas de bosques de pinos o presentando la grandiosidad de la roca desnuda en cortaduras laberínticas y profundas, por las que rumorosamente corren y saltan las pu-

defalas la puran akvon de *l'Escabas*. En la malnova monaĥejo, sur la muroj, ornamante ĉi tiujn, oni skribis multenombrajn versaĵojn, kiuj estas interesaj belaj, kortuŝantaj, kaj multaj literature meritplenaj.

Ĉu oftaj rokdefaloj en la monaĥejon kaj la ruiniĝanta stato de la konstruaĵo, eble serĉi plej grandan oportunecon por la vivo, kiel okazis en aliaj lokoj kaj monaĥejoj, decidis la monaĥojn por starigi novan monaĥejon en najbara loko, kaj al la nova translokigis la plej grandan parton el la versaĵaro aŭ mura antologio.

Jen sekve tri el la versaĵoj:

Viajn kulpojn ni jam konos;
vi neniel ilin kaŝu;
al konfeso, nu, vi paŝu
aŭ publike ili sonos,
ĉar vi nepre ilin donos
en la juĝ' universala
por eterna pun'fatale:
nu; konfeso estas celo
por aliri al ĉielo;
ilin kaŝi, celo mala.

* * *

Vi konsciu, do, kristano,
ke ĉielo kaj infero,
bon'eterna, samsufero,
estas nun ĉe via mano.
Poste diru ne je vano,
kiam venu tre surprize
tre severe kaj precize
juĝ', ĉar ĝi neniam cedis:
«Mi ne pensis..., mi ne kredis!»...
Tiel diras mi avize.

* * *

Ĉu mi pie LIN adoras,
ploras;
antaŭ bildo de l'MARTIRO,
sopiro;

ras aguas del Escabas. En el antiguo convento, sobre los muros, adornando éstos, se escribieron numerosas poesías, interesantes, bellas, conmovedoras, y muchas de ellas de un gran mérito literario

Bien los frecuentes desprendimientos de la roca sobre el convento, y el ruinoso estado del edificio, quizá buscar una mayor comodidad para la vida, como en otros lugares y conventos ocurrió, decidieron a los frailes a construir un nuevo convento en lugar vecino, trasladando al mismo, en su mayor parte la colección de poesías o antología mural del viejo convento.

He aquí tres de esas poesías:

«Tus culpas se han de saber;
no las quieras encubrir;
o tú las has de decir,
o en público se han de ver.

Y si se ven ha de ser
en universal gobierno
para tu castigo eterno;
pues ¿no es mejor, con victoria,
decirlas para la gloria
que oírlas para el infierno?»

* * *

«Advierte y juzga cristiano,
que la gloria y el infierno,
tu bien y tu mal eterno,
están ahora en tu mano.

No digas después en vano,
cuando venga de improviso,
en punto estrecho y preciso,
de la justicia la vara:
¡Quién dijera, quién pensara!,
pues ya tienes el aviso.»

* * *

«Cuando tu imagen adoro,
lloro;
cuando tu retrato miro,
suspiro;

de l'doloro LIA, daŭro,
bedaŭro;
al mi estu sama laŭro
de mirinda LIA morto;
antaŭ LI, jen mia vorto:
ploro, sopir'kaj bedaŭro!

Tiel, do, la turisto povas ĝui la mirindan paĝon de tiu libro, tiun de la Intermonto de Priego, konfortigante sin per la rigardado de la Naturo kaj de la Arto, koncentrigante sin spirite en la esencon de la strofoj kiuj aperas sur la muroj de l'klaŭstro, de la ŝtuparo, de la manĝejo kaj supren la pordoj de la ĉeloj. Hodiaŭ la nova monaĥejo estas restadejo de multenombraj familioj dum la somero.

PRI INTERPUNKCIO POR LA SKRIBAĴOJ ANTAŬAJ KLARIGOJ

Ĉar la interpunkcio estas sama por ĉiuj lingvoj, ni elmontrós tion, kio koncernas la hispanan, kvazaŭ gvidilon por la Esperanta.

Paroli estas uzi parolojn (*vortojn*), kombinante ĉi tiujn, por transigi la penson al ceteraj similuloj. Oni povas esprimi la penson pere du formoj: *ideo* kaj *juĝo*. La unua esprimas koncepton aŭ reprezentataĵon, kiun oni faras al si mem, pri io konkreta aŭ abstrakta: *homo*, *boneco*; la dua esprimas la agon pri la ideojn, la jeson aŭ neon pri la ideoj, atribuas al ili kvalitojn; esprimas, ke io estas, ekzistas, staras aŭ kuŝas, moviĝas, transformiĝas, okazas, k. c. Oni reprezentas la ideojn per *paroloj* (*vortoj*), la juĝojn per *propozicioj*, kiuj estas aroj el paroloj (*vortoj*), kaj en ĉiu aro aŭ propozicio ĉiu parolo (*vorto*) siavice havas difinitan rolon, kaj inter la paroloj (*vortoj*) ekzistas ankaŭ preciza rilato, esprimante kompletan signifon, sendependan signifon. Ne estas ĉi tie la preciza loko por klasigi la propoziciojn, tamen ni diros, ke la *jesantan* oni nomas *tezo*, kaj ĉiujn ceterajn (neantan, demandantan, demandanta-neantan, kondiĉan, imperativan, k. c.) *aneŭtezo*; ke la propozicio, kiu per si mem sola, esprimas komplete, absolute kaj sendepende, la penson,

oni nomas *ĉefa*, *reganta* aŭ *sendependa*, kaj tiujn, kiuj sen la ĉefa restigas nekomplete la penson, *regataj*.

Ĉion, kio ĉe propozicio respondas al la ĉefa verbo, oni nomas *membro*, *elemento*. En la ekzemplo: *Esperanto donas kons-tante al la homoj facilan rimedon por praktiki ĉiajn interrila-tojn*, oni serĉos la elementojn laŭ la jeno: Kiu donas? *Esperan-to*. Kion ĝi donas? *Facilan rimedon*. Al kiu ĝi donas? *Al la homoj*. Kiam ĝi donas? *Konstante*. Por kio ĝi donas? *Por prak-tiki ĉiajn interrilatojn*.

La membroj aŭ elementoj povas esti *ideaj* kaj *juĝaj* aŭ *pro-poziciaj* (rememoru tion diritan antaŭe pri *ideo* kaj *juĝo*), *simplaj* kaj *malsimplaj*, *kompleksaj* kaj *malkompleksaj*.

Ideaj estas tiuj reprezentataj de nomoj aŭ de kiu ajn alia pa-rola (vorto); *propoziciaj*, tiuj reprezentataj de verbo kun kom-plemento, t. e., de propozicio. En la antaŭa ekzemplo, ĉiuj ele-mentoj estas ideaj escepte la lasta, kiu estas propozicia.

Simplaj estas tiuj, kiuj konsistas el unu sola ideo, kiel ĉe la jena ekzemplo: *oni faris la ŝipon el ŝtalo*; *malsimplaj*, tiuj, kiuj konsistas el du aŭ pli da du ideoj formantaj serion; ekzemple: *oni konstruis la ŝipon el ŝtalo, el fero kaj el ligno*.

La membroj aŭ elementoj estas kompleksaj kiam la ĉefa parto estas akompanata de parola (vorto) aŭ propozicio, kiu ĝin modifas, ĉu kompletante ĝian signifon, ĉu aldonante iun rimar-kindan cirkonstancon, ekzemple: *la forto de la praveco, de la rajto, de la justeco, devas esti la principo, kiu regu la homojn. De la rajto, de la justeco, estas modifantaĵoj* por la subjekto; *kiu regu la homojn estas modifantaĵo* por la komplemento, kaj la *modifantaĵoj* povas esti *determinantaj* kaj *klarigantaj*: se oni forigas la unuajn, oni falsigas la penson, tiel, en la jena ekzem-plo: *la viro, kiu estas honora, meritas la ĝeneralan estimon*, la parto de la ekzemplo inter la unua komo kaj la dua estas pro-pozicia modifantaĵo determinanta, ĉar forigante ĝin, la penso ne ĉiam estas certa: *la viro.meritas la ĝeneralan estimon*. La klarigantajn oni povas forigi, ĉar spite de tio la penso restas neŝanĝebla; ekzemple: *Esperanto, kiu entenas belegan internan ideon, estos la dua lingvo por ĉiuj*, se ni forigus la parton inter la unua komo kaj la dua, la penso restadas kompleta.

pendiente, mientras se llaman *regidas* o *subordinadas* aquellas que sin la *principal* dejarían la significación incompleta.

Todo lo que en una oración responde al verbo principal se llama *miembro*. Así, en el ejemplo, *el Esperanto da constantemente a los hombres el medio fácil para practicar toda clase de relaciones*, se buscarán los miembros del modo siguiente: ¿Quién da? *El Esperanto*. ¿Qué da? *El medio fácil*. ¿A quién da? *A los hombres*. ¿Cuándo da? *Constantemente*. ¿Para qué da? *Para practicar toda clase de relaciones*.

Los miembros pueden ser de *idea* y de *juicio* u *oracionales* (recuérdese lo dicho anteriormente sobre *idea* y *juicio*), *simples* y *compuestos*, *complejos* e *incomplejos*.

De *idea* son los representados por nombres o cualquier otra palabra, y *oracionales* los representados por un verbo y su complemento, es decir, por una oración. En el ejemplo dado todos los miembros son de *idea*, excepto el último, que es *oracional*.

Son *simples* si constan de una sola *idea*, como en el ejemplo siguiente: *Se hizo el buque de acero*; *compuestos*, si constan de dos o más *ideas* formando serie, por ejemplo: *Se hizo el buque de acero, hierro y madera*.

